# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 13/10/2022 Sescentdekkvara eldono (unua eldono 20/09/2011)**




## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .
Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ http://thesaker.is/

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 681,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **299,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **154,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **137,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018
Nun studas **91,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )



## Esperanta Retradio



DONAS BONAN ĈIRKAŬ-5 MINUTAN AŬSKULTADON KAJ LEGADON ĈIUN TAGON

**Nobel-premio 2022: Genetiko de prahomoj**

7-a de oktobro 2022

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondecas pri via sano, do portu maskojn.

*Roger Springer*

Andrei Martyanov's broadsides (Tuesday, October 4, 2022) – The Greanville Post

# AVERTO: Ne por timemaj aŭ facile ofendeblaj




Plej altnivela rusa nuklea submarŝipo malaperis el sia haveno en la Arkto kune kun sia nova "armilo de la finjuĝo", laŭ pluraj raportoj. NATO laŭdire avertis membrojn, ke la rusa Belgoroda submarŝipo ŝajnis ne plu funkcii el sia bazo de la Blanka Maro, kie ĝi aktivis ekde julio. Oficialuloj avertis, ke Rusio povas plani testi la armilsistemon de Belgorodo "*Poseidon*", dronon ekipitan per atombombo, kiu ,laŭ la aserto de Rusio, kapablas krei "radiaktivan cunamon", laŭ italaj amaskomunikiloj. La drono povas esti deplojita de la submarŝipo en ajna momento kaj krevigita je profundo de 1 kilometro proksime de marborda urbo. Rusaj ŝtataj amaskomunikiloj asertis, ke la aparato povas krei 1,600-ft. (500 metraj) ondon kiu frakasiĝas en la marbordon kaj surradias ĝin.

Iu devas klarigi al *Petraeus* kaj lia speco de "generaloj" kiuj perdis ĉion (militojn) kiujn ili iam batalis, ke Belgorodo portas 6 Pozidonajn dronojn kaj tiuj, havantaj senliman intervalon kaj rapidecojn pli ol 100 nodojn, ne estas interkapteblaj de iu ekzistanta ASW. Tio signifas ke ĝi portas ne nur nukleajn provizaĵojn, sed ankaŭ povas porti aĉan amason da konvenciaj eksplodaĵoj anstataŭ atombomboj, kaj tio signifas ke ununura Belgorodo povas subakvigi 6 usonajn mararmeajn nukleajn aviadilŝipojn. Kaj mi volas diri laŭvorte eksplodi ilin el la akvo per konvenciaj eksplodaĵoj. Ĉu niaj malamikoj volas ludi ĉi tiun ludon? Trovis *Roger Springer*



# Skribu pri via klubo

# Milita uzo da la spaco

Unuiĝintaj Nacioj, 4 oktobro. /TASS/. Usono, en la kunteksto de la konflikto en Ukrainio, deplojas komponantojn de civila infrastrukturo en la spaco por militaj celoj, sed tia kvazaŭ-civila infrastrukturo povas esti legitima celo por reprezalio. Tion konstatas Vladimir Yermakov, Direktoro de la Departemento pri Nedisvastigo kaj Kontrolo de Armiloj de la Rusa Ministerio pri Eksteraj Aferoj, anoncita marde en kunveno de la Unua Komitato de la Ĝenerala Asembleo de UN. La tekston legis lia deputito Konstantin Vorontsov. "Dum la eventoj en Ukrainio aperis nova ege danĝera tendenco. Ni parolas pri la uzado fare de Usono kaj ĝiaj aliancanoj de civilaj infrastrukturaj komponantoj en la spaco, inkluzive de komercaj, por militaj celoj," la diplomato diris ke tio esence konsistigas rektan partoprenon en armitaj konfliktoj, kaj kvazaŭ-civila infrastrukturo povas esti legitima celo por reprezalio. Do la rezulto de la agoj de la Okcidento, la daŭripovo de pacaj spacaj agadoj, same kiel multaj sociekonomikaj procezoj sur la Tero, de kiuj dependas la bonfarto de homoj, estas elmontritaj al nepravigeblaj riskoj " Trovis *Roger Sp*

# Birdocerbo (signifanta *etkapabla*.) eble Ne!

Oni lernas ion novan preskaŭ ĉiutage. En la angla ekzistas malestima esprimo, *birdbrain* (birdocerbo), signifanta *etkapabla*.



Sed verŝajne birdoj ne posedas etetajn cerbojn. Male. Nu, eble etajn laŭ grandeco, sed tre lertajn.

Niaj kakatuoj - kaj eble kelkaj AE-legantoj jam spertis la problemon - lernis ne nur malfermi la kovrilojn de rubaĵujoj, sed ankaŭ forpuŝi la rokojn, brikojn, k.t.p. metitajn tie de agaciitaj homoj.

Internacian atenton la birdoj meritas - kaj jam ricevis! Germana konduto-ekologisto studas la aferon kaj nomis ĝin novenkondukaĵa armilokonkurso *(innovative arms-race)* inter la kakatuoj kaj la homaro. 🤗 *Vera Payne*



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.

Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.

La 15a de oktobro estos la tria sabato. Ĉiuj bonvenaj *Roger Springer*

Komercaj militoj kaj sankcioj signifos la finon de la Imperio kaj mondliberigon, inkluzive por la usona popolo. – La Greanville Poŝto– The Greanville Post

# Adelajdo kaj Kanbero renkontiĝas




Helen kaj Sandor refoje renkontis Caitlin, Giles kaj Steven en Kanbero la 9-an de Oktobro.
Ne hezitu kontakti ilin kiam vi vizitas nian ĉefurbon. *Sandor Horvath*





Kiom da esperantistoj necesas por ŝanĝi ampolon? Du esperantistoj.
Unu por subteni la ŝtupetaron, kaj unu por ŝanĝi la ampolon!
Fakte multajn pliajn, ĉar esperantistoj ja treege ŝatas la vorton "ampolo". Ili ja amas, ĉu ne? Ili amas, kaj kiujn ili amas? Ili amas Zamenhofon pro ties granda donaco, kiun li donacis al la tuta homaro, kaj ĉar li ja estis polo, ili amas ja ankaŭ la vorton "polo". Ĉu vi bone komprenas tion? *Bob Felby*

## 3ZZZ





.........En la elsendo de la 10a de oktobro troviĝas informoj pri diversaj movadaj eventoj. Alia temo estas mikronacioj .

.

*FranciskaToubale*



# Esperanto-grupo en la radio 3zzz.

Mi jam invitis vin fari donacon  kadre de la radiotono , kiu okazas ĝis la fino de la monato. La grupo devas arigi $1000 por havi la rajton elsendi sian programon dum la venonta jaro. Heather Heldzingen, nia kasisto, kolektas la monon. Eblas kontakti ŝin telefone je la numero 0419 895 934 aŭ retpoŝte je la adreso erikino.48@gmail.com

Vi povas ankaŭ uzi la retejon de la radio www.3ZZZ.com.au , sed en tiu kazo ne forgesu mencii ke via donaco iras al grupo Esperanto kaj bonvolu informi Heather . Estas ĉiam iom maltrankviliga demandi sin ĉu ni atingos la petitan sumon aŭ ne.

Sed mi ricevis grandan ŝokon pasintan lundon kiam mi akiris la liston de la membroj : nur 29 nomojn ĝi enhavas dum ,laŭ la regulo ,necesas 40 membroj. Se vi volas ke daŭrigu tiun elsendon en Esperanto , finance subtenu nin , fariĝu membro. Tio kostas $16 jare kaj por la maljunuloj $ 11 jare. Eblas uzi la samajn pagrimedojn kiel por la radiotono. Bonvolu helpi nin. La tuta teamo antaŭdankas vin .

La kunvokanto, *Franciska Toubale*

